


NORDFRANCA

ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio
kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redakto kaj administrejo :
18, rue Albert I^{er} - DUNKERQUE (Nord)
C. VERNAY, Direktoro-Prirespondanto
G. VANHOVE, Administranto

Redakta Komitato, redaktas

Jarabono : Francujo 10 frankoj
aliaj landoj : 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro
POŬTĈEKKONTO : LILLE 403-50
C. VERNAY, DUNKERQUE

Les bonnes adresses de Dunkerque...

KODAKS
PHOTO-AMATEURS

CAYEZ

9^{bis}, Rue Clémenceau - DUNKERQUE

Travaux - Agrandissements
* Stochs de toutes marques
Esperanto parolala

ATELIER DE RELIURE ET CARTONNAGE
(Fondé en 1860)

Louis BLOT

10, Rue Dupouy, DUNKERQUE

Reliure en tous genres
de luxe et d'amateur
Esperanto parolala

IMPRIMÉS EN TOUS GENRES - PAPETERIE
RELIURE - GRAVURE
Fournitures classiques et de bureau

Librairie du Beffroi

Albums et Timbres pour Collectionneurs
Livres - Insignes Espérantistes

MOREAU-FOURMEUX

28, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

"Au Roi du Saucisson"

Roger BRATS

30, Rue Michelet
COUDEKERQUE-BRANCHE

Fromages, Conserves, Confitures
Vente sur tous les Marchés de la Région

Fabrique de Casquettes
BÉRETS - CHAPEAUX

EDMOND

Chapelier

38, Rue Poincaré - DUNKERQUE

"Les BLEUETS"

26, Rue Poincaré - DUNKERQUE

Blanche RAMOUT

Fleuriste

Vous y fournir, c'est affirmer votre bon goût
Choix de Plantes - Corbeilles
Gerbes et Bouquets

**Les Coopérateurs
de Flandre et d'Artois**

Toute l'Alimentation
Tous les Vins
Tous les Spiritueux

Poids exact, Juste Prix, Qualité parfaite
Nos succursales sont ravitaillées chaque jour

en Pain, Lait frais pasteurisé
Fruits, Charcuterie, Beurre

VENTE A TOUS

Avantages accordés aux sociétaires :
Ristourne au prorata des achats
(3.194.244 frs répartis pour 1935)

Secours de la Mutualité Coopérative
(naissance, maladie, décès)

Journal gratuit tous les 15 jours

Dans nos 450 magasins, vous trouverez

la qualité que vous cherchez

les prix qui vous conviennent

Tout l'HABILLEMENT

Hommes, Jeunes Gens
Enfants

AU BON VÊTEMENT

Maison O. ROZEN

17, Rue des Chaudronniers

DUNKERQUE

Esperanto parolala

FIRMO

Georges MAEGHT

Juvelisto - Artobjektoj

9, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

Esperanto parolala

Rabato al niaj Samideanoj

NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

2^a Serio - 15^a Jaro

Noj 3-4

JANUARO-FEBRUARO 1938

NORDFRANCA ESPERANTISTO

deziras al ĉiuj legantoj sukcesan

kaj feliĉan Novjaron !



S-ro ALBÉRIC HUMEZ,

Prezidanto de la Nordfranca Esperanto Federacio
kia ricevis en decembro la ordenon de
"Kavaliro de la Honora Legio".

Ĉiuj bone konas lin. Liajn meritojn ni ne volas, ĉi tie rememorigi.
Tamen estu permesate al ni diri ke dank'al lia longa kaj senlaca agado
sur la esperantista kampo, ni ŝuldas al tiu pioniro viglan antaŭeniradon
de nia movado en la norda regiono.

Ni tutekore gratulas la novan "legianon" kaj ĝojas kun la Esperantistoj
pro la honorigo farita al ilia Prezidanto de la franca registaro.

LINGVAJ KAJ LITERATURAJ RIDATOJ EN SVISLANDO

(represo malpermesita.)

Ĉiu homo scias, ke en Svislando pluraj lingvoj estas parolataj sed pri la distribuo de tiuj lingvoj multloke regas malklareco. La ĉefa fakto estas, ke en Svislando la kvar naciaj lingvoj ne estas mikstataj, sed ke ĉiu el ili havas propran uniforman teritorion, kie ĝi regas sola. El la iom pli ol 4 milionoj da enloĝantoj preskaŭ tri milionoj parolas germane, 831.000 france, 242.000 itale kaj 41.000 romanĉe. — La lingvaĵo aktuale parolata en la tiel nomata germana parto tamen tute ne estas la regnogermana lingvo, sed la alemana dialekto, kiu malsimilas de la regnogermana lingvo ne malpli ol la nederlanda. En antaŭaj tempoj, t. e. ĝis la 17a jarcento oni skribis la alemanan lingvon kaj nur poste pli kaj pli la germana enpenetris kiel skriblingvo kaj hodiaŭ tute fortrudis la alemanan el la skribo, sed ne el la parolo. Ekzistas movado, kiu celas restarigi la alemanan kiel la oficialan skriblingvon de norda Svislando. En la velŝa parto (aŭ kiel la francvisoj mem nomas sin : la Suisse romande) la malnovaj dialektoj preskaŭ mortis kaj ĉie regas la franca lingvo en ĝia pariza formo. La itallingva parto (t. e. precipe la kantono Ticino) estas riĉa en dialektoj, sed skribas puritale. La romanĉa parto do estas kvazaŭ la sola, kiu posedas esence nacian lingvon kiu nur al Svislando apartenas, sed ĝi estas malgranda, splitiĝinta en tre malsimilaj dialektoj kaj devas batali (tamen kun sukceso) por ĝia ekzisto. Kiel lingvo la romanĉa staras laŭ sia fonologio kaj gramatiko mezvoje inter la itala kaj franca.

Konsiderante tiun variecon de lingvoj ekestas la demando, ĉu la literaturoj verkitaj en tiuj lingvoj povas havi ion komunan aŭ ĉu ili simple estas nemanstaraj partoj de la literaturoj de la samlingvaj grandaj najbaroj. La respondo estas : jes, ili havas ion komunan. La granda evento, kiu donis sian ŝtampojn al la svisa spirita evolucio estis la reformacio. Antaŭe la velŝa parto estis neproduktiva en literaturo kaj la alemana nur en kelkaj militaj kantoj el la epoko de la svisa grandpotenco manifestis propran karakteron. Antaŭe, en la epoko de la katolikaj ekleziaj teatraĵoj, antaŭe en la epoko de la trubaduroj kaj eĉ pli antaŭe en la epoko de la monakeja kulturo ĝi estis aktiva, sed ne tre tipa angulo de la germana spirita vivo. — En la reformacio la batalo inter protestantoj kaj katolikoj, kiu estis tre intensiva pro la proksima kunvivo de la du konfesioj, la protestantoj estis devigataj pravigi siajn ideojn kaj porti ilin per la skribo en ĉiujn domojn. Tiam la romanĉa literaturo originis, Biffnun tradukis la biblion en la romanĉan lingvon kaj presigis ĝin kiel unuan libron en tiu lingvo; Zwingli tradukis ĝin en la alemanan. Calvin kaj la siaj malfermis tre viglan literaturan agadon por siaj religiaj celoj. Nur Ticino restanta pure katolika kaj centra Svislando dormis. Sed Bâle, Berne, Zurich, Lausanne kaj Genève tiam fariĝis spiritaj centroj kaj profitis de tiu situacio ĝis hodiaŭ. Tamen pro la religia disputemo oni neglektis la formon de la literaturaĵoj; oni ne sukcesis krei iun daŭran verkaĵon. Sed restis el tiu tempo tendenco utiligi la literaturon kiel instruon, klerigan instrumenton; restis certa tono de predikado kaj edukado, kiu estis tipa. Dua tipa trajto estas la kunligo de literaturo kun la ŝtato, same kiel la reformistoj Calvin kaj Zwingli kunligis religion kaj politikon. Literaturistoj ofte estis ŝtatviroj samtempe, ekz. A. v. Haller, aŭ plej fama ekzemplo Gottfried Keller. Aŭ ili estas pastroj aŭ instruistoj; tio validas ankoraŭ hodiaŭ plene. Metropolaj bohemiaj ka-

fejaj verkistoj komplete mankas. Neniam la literaturo perdis tiamaniere la konektor kun la praktika vivo.

Se la edukata tendenco de la svisa literaturo originis en la reformacio ĝi estis (post la sterila 17a jarcento) renovigata de la aĝo de la racionalismo en la 18a jarcento (Pestalozzi) kaj aldoniĝis nacia tendenco. Tiam la svisoj unufoje klare konsciis pri sia propreco kaj pri la speciala karaktero de sia patrolando. Oni tial nomas tiun jarcenton la aĝo de la helvetismo. Samtempe en alemana Svislando la konekto kun la germana literaturo estis pli forta ol iam ajn. Bodmer kaj Brelinger faris Zŭrichon literatura metropolo kaj kvazaŭ fondis propran skolon opoziciante Gottsched en Leipzig. Klopstock, Wieland kaj Goethe ofte restadis en Svislando kaj Schiller prenis la temon de Wilhelm Tell por la samnoma fama dramo. Svislando donis impulson al la germana literaturo per la poemoj de Haller kaj la teorioj de Bodmer. En Zŭrich vivis Gessner, la ŝatata idiliisto, favorulo de la Ancien Régime.

La 19a jarcento alportis la rekonstruon de la svisa federacio kaj la klasikan tempon de ĝia literaturo. La tria granda tendenco de nia literaturo ekestis : la kampula, hejmeca, lokala. Ĝia unua granda realiganto estis Gotthelf, berna pastro, kiu kunligis la kampulan kun la eduka tendenco; la dua Keller, la granda humoristo kaj ekster tiu vico staras Meyer, kiu kun siaj klasikstilaj noveloj turniĝis al la renesanca Italujo. Velŝa Svislando havis sian klasikan epokon en la 18a jarcento, kiam ĝi donacis al Francujo Rousseau kaj M^{me} de Staël. Kvankam ambaŭ povas ŝajni kvazaŭ internaciaj verkistoj, ili malkaŝas ĉiam sian svisan devenon : Rousseau kiel filo de la malgranda libera-demokratia de Genève kaj de la majesta svisa pejzaĝo, M^{me} de Staël, la malamikino de Napoleono kiel tipa reprezentantino de la protestantismo, kiu protestas kontraŭ la perfortoj de Napoleono kaj tiel unua konigas al Francujo la trezorojn de la germana najbara literaturo.

La moderna tempo estas karakterizata de la hejmeca, nacia tendenco en la literaturo. La pejzaĝo, la montoj, la simplaj kampuloj eniĝas en la literaturon; oni eĉ verkas en la dialektoj. Zahn, Heer, Lienert, Federer en alemana teritorio, Ramuz en velŝa, Zoppi kaj Chiesa en itallingva, Muoth, Nay, Matthis en romanĉa reprezentas tiun branĉon.

Interesa estas la kompleta sterileco de Svislando en la epoko de la romantiko kaj ĝia malgraveco en poezio. La svisa spirito estas proza, realema kaj iomete utilema; tio ne malhelpas plej altajn artverkaĵojn en romano kaj novelo, sed fermas la regionon de la poezio.

Arthur BAUR.

NI DAURIGU !...

Kiam mi demandas miajn knabojn : « Ĉu vintro estas bela sezono ? » Preskaŭ ĉiuj, ekkrias : « Jes ! » Ili imagas la blankan neĝon : la ĝojigajn glitadojn, la longajn vesperojn ĉe la forno, la vintrajn festojn, kun la tiel dezirintaj donacoj, ludiloj, k. t. p... Ili ne vidas la malfeliĉulojn, kiuj ne posedas sufiĉe da mono kaj havas nur malvarmajn vestojn, malhejtajn loĝejojn, kaj malfortajn manĝaĵojn; aŭ la kompatindajn bestojn, kiuj multnombro mortas pro malvarmo...

Homoj ! homoj ! la rido sanigas, jes, tamen estas bone ke, de tempo al tempo, oni pripensu seriozajn temojn, oni lasu la koron moligi...

Mi petas vin, aŭskultu la rakonton de la knabineto kun la alumetoj, kiun mi tradukis el Andersen...

Kiel frostis, en tiama vintro! Neĝo faladis kaj ekvesperiĝis... Estis la lasta vespero de la jaro, la antaŭvespero de Novjaro.

En tiu malvarma nokto, mizera knabineto iris sur la strato, senĉapele kaj senŝue... En eluzita antaŭtuko, ŝi enhavis grandan kvanton da alumetoj, kaj ŝi tenis unu skatoleton en la mano. Neniam el ili ŝi vendis en la tuta tago; neniam donis al ŝi eĉ unu monereton. Ŝi malsategis, la kompatinda infano, ŝi malvarmiĝis kaj malgajege mienis. — La neĝflokaj faladis inter ŝiajn harojn, longaj kaj belaj haroj, kiuj tiel infancarme friziĝis sur la nuko, sed, certe ŝi ne pensis fieri pri ili...

Lumoj briladis ĉe ĉiuj fenestroj, kaj la strato estis plena je la bonega odoro de la anseroj rostigitaj por la vespera festeno. Estis la antaŭvespero de Novjaro: jen kion ŝi pensadis...

Ŝi rifugiĝis en iom pli ŝirmitan angulon, inter du domoj, sed tie ŝi tamen ankoraŭ frostotremis. Ŝiaj malgrandaj manoj estis rigidigitaj pro la malvarmo... Ho ve! Kiom da bono unu eta alumeto farus al ili! Ŝi eliris unu: riĉ! Kia brilanta lumo! Per la mano ŝi ŝtemkovris la flamon, kiu iĝis varma kaj bela, kia bona varmo! Ŝi imagis sin sidanta antaŭ granda forno el fando, ornamita per kupobuloj. Ho, la bela fajro, kiel ĝi bone varmiĝas!... La etulino estis etendonta siajn piedojn por varmiĝi ilin, kiam la flamo estingiĝis kaj la forno malaperis: ŝi retroviĝis sidanta en angulo, peceton de alumeto forbruliginta en la mano...

Ŝi frotis duan, kiu brulis, kiu flamis, kaj la muro, sur kiun falis la lumo, iĝis diafana kiel gazo; ŝia rigardo nun penetris en riĉan ĉambron. Sur la tablo, kovrita per bela tablotuko kaj ŝarĝita per delikataj porcelanaĵoj, fumiĝis grasa ansero rostita, farĉita per prunoj kaj pomoj; sed jen la ansero kun la tranĉilo kaj la forko ankoraŭ enigitaj en la dorso, saltis el la tablo, kaj balanc-marŝante, alvenis al la knabineto. La alumeto estingiĝis: antaŭ la infano restis nur la dika kaj malvarma muro...

Ŝi frotis trian! Tuj ŝi vidis sin sidanta sub belbrilega kristnaskarbeto. Kiel bela ĝi estas! Sur la verdaj branĉetoj, mil kandeletoj brilegas, kaj bildoj multkoloraj, kiel tiuj, kiujn oni vidas en montrofenestroj, ŝajnas kvazaŭ ili ridetis al ŝi. La etulino etendis la du manojn: la alumeto estingiĝis. Ĉiuj kandeloj iris ĉiam kaj ĉiam pli supren, kaj ŝi ekkomprenis ke ili iĝis brilantaj steloj. Unu el ili falis kaj desegnis en la ĉielo longan fajrostrekon...

Ŝi ankoraŭ frotis unu kontraŭ la muro: klarega brilo disvastiĝis kaj, en la mezo de tiu brilanta lumo, ŝi imagis ke ŝi vidas sian maljunan avinon — mortiĝantan ho ve! delonge — kun mieno tiel dolĉa, tiel radia, kaj tiel bona...

— Avinjo, ekkriis la infano, mi petas vin, konduku min kun vi: ĉar se la alumetoj forestingiĝas, mi scias ke vi malaperos sammaniere kiel la forno tiel varma, kiel la belega rostita ansero kaj la bela kristnaska arbeto! Rapide, rapide, ŝi frotis ĉiujn alumetojn, kiuj restis en la skatoleto, por reteni la avinon kiel eble plej longe. Kaj la alumetoj brilis per brilo pli vigla ol tiu de la tago. Neniam avinjo estis tiel bela!...

Sed kiam venis la malvarmega mateno, en la angulo, inter la du domoj, sidis knabineto kun vangoj iom violkoloraj kaj rideto sur la lipoj... Mortinta!... Mortinta pro malvarmo; en la lasta tago de la jaro. La unua tago de la Novjaro sin levis super la eta senviva korpo kiu tenis en la rigidigita mano la restaĵon de brulinta alumeto...

ADE.

✻ POR RIDI ✻ LOĜEJOJ

En tiu kriza epoko, certe okazis plurfoje al vi same kiel al mi, ke la ĉiutaga zorgado forokupis vin, ke maltrankvilo persekutis vin, aŭ ke ia nedifinebla melankolio obsedis vin. De tio, plej bonorde ekvilibrataj mensoj ne ĉiam kapablas rifuĝi.

Kelkaj, en tiu stato, serĉas distraĵon ĉu ĉe ludado: kosta afero, ĉu ĉe drinkado: fi naŭze! aŭ ili promenas: ho kiom monotone!

Al tia malgaja kaj danĝera spiritstato mi trovis unu drastan kuracilon, kiun senhezite mi rekomendas al ĉiuj splenuloj de l' vivo:

Vizitu la luotajn loĝejojn! Ha! kia neelĉerpebla fonto da ĝojo kaj gajo, kia distra okupo estas la vizito de vakantaj domoj.

Jen. Vi eniras subite, akompanite de la pordisto en la ĉambron de sinjoro aŭ de sinjorino pri kiu vi scias nenion. Vi provas diveni per via observema filozofa rigardo la kutimojn, maniojn, inklinojn de geedza paro antaŭe neniam vidita kaj verŝajne nerevidota; vi diskrete malfermas la murŝrankojn, kun evidenta kontento vi estigas trablavon en ĉambro zorge fermita de la mastrumantino, vi plej bagateleme atentis ĉu la kamentoj bone spiras, vi certigās ke la pordoj ne kuaras, vi larĝe malfermas la fenestrojn por ĝui la vidaĵon, funkciigas la ŝlosilojn en la seruroj, vi laŭte opinias ke la mŭrpaperoj velkiĝis, ke la plafonoj nigriĝis kaj bezonas novan ŝmiradon kaj fine, definitive, vi petas pardonon kaj foriras pro tio ke la luprezo estas tro kosta aŭ ke la etaĝo situas tro proksime al la ĉielo.

Jen distraĵo, guado, je kiu nek profunda ĉagreno, nek nigra malĝojo kapablos rezisti.

Ekzemple, sekvas tiaspeca dialogo inter pordisto kaj la vizitonto, mi, se vi volas. Estas la 11a matene, mi ceremonie, senĉapele:

— S-ro pordisto, vi havas luotan loĝejon.

Pordisto: — Jes, Sinjoro,

— El kiom da ĉambroj?

Pordisto: — Kvin, Sinjoro.

— Je kia etaĝo?

Pordisto: — Je la kvara.

— Je kioma prezo?

Pordisto: — 5.400.

— Ĉu ĝi estas videbla?

Pordisto: — Certe. Kaj li kunprenas la ŝlosilon, antaŭiras min kaj ambaŭ ni grimpas la etaĝojn; mi facile, svelte, li peze, spirege.

Je la pordo de la loĝejo, en la momento, kiam li enkondukas la ŝlosilon en la truon:

— Kiom la prezo, vi diris?

Pordisto: — 5.400.

— Ĉu tiu prezo entenas la nutraĵon?

Pordisto: — ! ? !

M. DELCOURT.

NI LA KOMENCANTOJ

Martino en la Paradizo

Martino estis bona homo, kiu ŝatis labori sed... ne tre. Li preferis (fiŝkapti) kapti fiŝojn. Ankaŭ tio estas laboro diris Martino al sia patro, kiu estis kuracisto (doktoro).

« Laboro ? », diris lia patro, « Tute ne, vi prenas la feliĉajn fiŝojn el la akvo kaj mortigas ilin ».

« Nu — diris Martino — kaj kion faras vi, kara patro ? Vi mortigas multajn homojn; ĉu tio estas pli bona ? »

Kaj Martino prenis la fiŝkaptilon (ilo por kapti fiŝojn), metis buterpanon en la poŝon, hotelon da bona vino en sakon kaj iris al lago, kiu troviĝis (sin trovis) proksime.

La vetero estis agrabla. Estis varme. Post kelka tempo Martino soifis, kaj sekve li trinkis grandan gloton da vino. Li lekis siajn lipojn kaj pensis; dolĉa, dolĉa. Preskaŭ tro. Kaj li trinkis ankoraŭ iom (malmulte). Sed lia «laboro» ! Ne, la fiŝoj ne venis. La korko de lia fiŝkaptilo tute ne moviĝis (movis sin).

Do, mi trinku ankoraŭ, diris Martino al si. Kaj baldaŭ (post mallonga tempo) la hotelo ne plu estis « hotelo da vino » sed « hotelo de vino ». Martino endormiĝis (venis en stacion de dormo). La suno keresis liajn harojn, vangojn; de temp' al tempo glitis dolĉa venteto tra branĉoj sur kiuj kantelis birdetoj. Estis paradize, (kiel en la paradizo).

Kaj aŭskultu ! Nun venas Eva. Martino bone aŭdis ŝiajn paŝojn. Trankvile li atendis. Kiel li supozis Eva iris rekte al li. Kiel bela ŝi estis. Sia vesto precipe. Tute nova folio de figarbo. Martino promeniĝis siajn okulojn sur la modela de perfekta beleco kaj...

Eva klinis sin. Martino sentis ŝian spiron kaj retenis sian spiron.

Kaj sekvis kiso. Nur kiso estis la unua. Poste mallonga paŭzo... nova kiso. Tio estis jam vera kiso. Kaj la tria estis pli ol granda kiso : kiseĝo. Martino aŭdis kiel la lango klakis en la buŝo de Eva. Estis agrable, preskaŭ tro. Sed Eva ne finis, ŝi spiris, kisetis, kisis, kiseĝis kaj lekis... ĝis kiam Martino malfermis siajn okulojn.

Dika bovino de kies buŝo pendis la salivo gapis al li. Estis paradize...

LITERATURA ANGULO

Ekzistas esperantistoj, kiuj opinias, ke nia lingvo ne sufiĉe rapide progresas. Ekzistas eĉ, kiuj foje dubas pri la fina venko.

Tamen ! Ĉu vi konas movadon, kiu mondscale venkis terenon, tiom rapide kaj certe, kiom Esperanto ?

Sukceso sekvas sukceson. Jus ni legis pri Radio Paris, kiu oficiale uzas Esperanton por la teatraj programoj.

Saĝa decido. Trans landlimoj, al malproksimaj landoj, ondas nun trezoroj de francaj verkoj. Unuafoje vibris la tipe franca sprito de Molière, en Esperanta traduko, tra la etero. Georgo Dandin, traduko de Zamenhof...

Vidu, tutmonde aŭskultis samideanoj. Parto certe konis la verketon. Aliaj ĝin tenis ĉenume dum la auskultado; sekvis laŭvorte la parolojn.

Nedube, ĉe l'fino direktis sin dankaj pensoj al la tradukinto, kiu pasigis horojn, noktojn, por plej bone redoni ĉi rimarkindan komedion de Molière. Kaj multaj certe komprenis, ke la malgranda peno sendi dankvorton al la stacio estas morala devo; plej simpla elmonro de aktiva partopreno en nia komuna laboro.

Por francoj, kiuj povas rekte kompari la tradukon kun la originalo, ĝi havas specialan valoron. Estas rimarkinde vidi, kiel Zamenhof solvis la tradukon de spritaĵoj, nuancoj delikataj kaj sukoplenaj esprimoj. Kaj povas esti, ke vi ne ĉiam konsentas kun li; emas serĉi alian solvon. Eble sukcese... eble ne. Sed certe vi konkludos, ke valoras koni, atente legi, ĉi tiun mondfaman komedion en nia Esperanto.

S.

NIAJ GRUPOJ

LENS

UNUAJ PASOJ

En la jaro 1905a, en la tuta mondo, la esperanta movado estis tro vigla : estis ja la jaro de la Unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer : pro tio, la propagando, en nia norda regiono, ricevis gravan antaŭenpuŝon.

Jam de Februaro 1905, grupo estis fondita en Arras. Post la Kongreso, ĝi efike propagandis en la regiono, kaj sukcesis interesigi kelkajn loĝantojn el Lens. En Novembro, parolado estis organizita sub la patronado de la Arras'a Grupo. S-ro Michaux, prezidanto de la Boulogne'a Grupo, bonvolis preligi : estis grava sukceso. La kunveno en la teatro de «l'Association des Anciens élèves des écoles de Lens», ĉeestis pli ol 500 personoj. S-ro Michaux entuziasmiĝis la aŭdantaron : tuj post la parolado, 140 personoj enskribiĝis por la kurso gvidota de S-ro Benoît, ano de la Arrasa Grupo, Atesto pri kapableco.

Du kunvenoj okazis ĉiu-semajne, kun fervoraj lernantoj. Je la oka leciono, pli ol 100 el ili ankoraŭ regule ĉeestis. Tiam, en la komenco de Marto 1906, okazis la teruriga katastrofo en la minejo «Courrières», kie 1100 miniistoj mortis pro eksplodo. Poste, okazis en la urbo ribeletoj kaj strikoj, la cirkulado iĝis malfacila, la kursgvidanto kaj la lernantoj ne plu povis atingi la kunvenejon. Tia situacio daŭris dum tri monatoj, la somera sezono tiam malhelpis la laboron, kaj tiu unua ekprovo ne estis sekvata de alia. Ankaŭ pro diversaj aliaj kaŭzoj, la movado en Lens ekdormis.

POST LA MILITO

Kiel oni scias, la urbo Lens estis tute ruinigita dum la milito : dum longaj jaroj, la loĝantoj devis unue pripensi la rekonstruadon kaj aliaj okupadoj estis forpuŝataj sur la duan lokon. Nur en la jaro 1933 denove temis pri Esperanto en Lens. Kunvenintaj en la kafejo de «La Mairie», deko da personoj decidis fondi grupon, kies unuaj gvidantoj estos : H. Lacrinier, M. Calvin, M. Mendlewicz, Kornberg, Kl. Vandevoorde. La nomo de la grupo estos «Groupe Espérantiste Lensois Zamenhof»; ĝi enkalkulas 35 anojn. S-ro Deligny, prezidanto de la Norda Federacio faras belan prelegon antaŭ 40 personoj; 25 el ili sekvas la kurson laŭ Cseh-metodo, gvidata de S-ro Brunet, el Arras.

En la jaro 1934a, nenia rimarkinda okazintaĵo.

Komence de 1935, pro agemo de S-roj Vandevoorde kaj Max, la grupo rapide pligrandiĝas kaj vigle laboras laŭ sia celo : propagandi kaj lernigi Esperanton. Nova komitato estas elktita : prezidanto : S-ro Vandevoorde; V.-prezidanto : S-ro Max; komitatanoj : S-ino Biro, F-ino Carpentier, S-roj Bernard, Lejeune, Yosbergue, Roussel. En januaro, en ĉambrego de la Lernejo Carnot, S-ro Sipke Stuit, nederlandano, prelegas pri Nederlando, kun kinobildoj; S-ro Brunet, el Arras, tradukas francan. 70 personoj ĉeestas.

Tuj poste, la grupo organizas du kursojn, en la sama loko. S-ro Delevenne, el Arras, S-ro Calvin, el Lens, gvidas ilin : en sia propra hejmo, S-ino Max instruas kelkajn el siaj amikoj.

La 29a de Aprilo, S-ro A. Humez, en la Urbdomo, prelegas pri "La problemo de universala lingvo, ĝia solvo per Esperanto". Urba konsilanto, S-ro Priem prezidas, 100 aŭskultantoj ĉeestas.

Dum Majo, ekkomencas du novaj kursoj, gvidantaj de F-ino Carpentier kaj S-ro Max. S-ro Centšnerver, sekretario de Federacio, prelegas esperante antaŭ 40 personoj; S-ro Humez organizas gajan vesperon, kiu kunigas 50 personojn. La 29an de Majo, intima festo por danki S-ron Delevenne : 11 el liaj lernantoj sukcesis la Ateston pri lernado.

En Oktobro, estas organizataj du novaj kursoj, gvidataj de S-roj Max kaj Vandevoorde.

La 22an de Decembro, sub prezido de S-ro Contart, Lernejestro, okazas kunveno en lernejo de Loos-en-Gohelle : 51 personoj aŭskultas S-ron Vandevoorde pri Esperanto, ili estas tre kontentigitaj kaj decidas organizi kurson, kiu okazos ĉiu-dimanĉe, sub gvidado de S-ro Vandevoorde : 20 junuloj regule ĉeestas.

Jam de l'komenco de la jaro, la Lens'a Grupo aliĝis al la Federacio de la Norda Regiono. La 7-an de Oktobro, ĝi estis lege registrata en la Sub-Prefektejo en Béthune.

Kaj jen 1936 ! Dimanĉon, 2an de Februaro, la Grupo kore kaj ĝoje akceptis la delegitojn de la Federacia Komitato, 60 el ili ĉeestas. Ili laboras sub honora prezidanteco de S-ro Deligny, kaj efektiva de S-ro Humez, helpata de S-ro Centšnerver, federacia sekretario.

La 20an de Februaro, inaŭgura kunveno por kurso laŭ Cseh-metodo. La provleciono okazas en ĉambrego de la Urbdomo, sub la prezido de S-ro Mouton, Lernejestro, riprezentanto de S-ro Locqueneux, Lerneja Inspektoro, malhelpata pro malsano. Unue, S-ro Humez klarigas la demandon pri universala helpa lingvo; F-ino M. Saxl, diplomita instruistino de Cseh-Instituto instruas la provlecionon, sekve de kiu 44 lernantoj fervore ĉeestas la kurson.

La 24an de Marto, en la Urbdomo, S-ro Julio Baghy, famekonata samideano hungara, parolas en Esperanto pri "Evoluo de la lingvoj, laŭkonformaj principoj, kiuj gvidis la kreinton de Esperanto, la nuna stato de originala literaturo en Esperanto". 60 personoj ĉeestas.

Dum Majo, okazas supera kurso laŭ metodo Cseh, gvidata de S-ro Sipke Stuit : 25 lernantoj, el kiuj multaj sukcesas la ekzamenon "Atesto pri lernado".

Notinde estas, ke ĉiuj paroladoj kaj kursoj ĉi supre raportataj, estis ĉiam publikaj kaj senpagaj. La gvidantoj de la movado en Lens, ĉiam bonvoleme laboris, ilin nura celo estis kaj estas utili al Esperanta idealo.

La grupo estis daŭre favorigata de la kuraĝigoj de oficialuloj, ĉu de Urba Konsilantaro, ĉu de S-ro Locqueneux, Inspektoro de la Unugradaj Lernejoj. Ĝi disponis senpage ĉambrojn en lernejoj kaj urbaj konstruaĵoj. La Urba Konsilantaro voĉdonis 250 fr-an monhelpon por 1936; la grava "Association des Mutilés et Anciens Combattants de Lens" donacis sumon de 100 frj. kaj petis enskribon kiel "Honora Membro" de la grupo.

Dum la jaroj 1936 kaj 1937a la esperantista vivo estis tre vigla en Lens. Dank' al aro da sindonemaj samideanoj, nia movado progresis kontentige. Kaj de nun niaj Lens'aj geamikoj zorge preparas kaj organizas la grandan manifestacion kiu okazos en Lens la 22an de Majo 1938; la 19an Esperanto kongreso de Nordfranca Federacio. Pli ol 80 gesamideanoj jam aliĝis kaj ni antaŭvidas gravan sukceson por nia afero.

Ni petas ĉiujn Esperantistojn kiuj ankoraŭ ne aliĝis tuj fari. Por la fruaj aliĝantoj la kotizo estos nur 5 F. F. Poste ĝi estos duobligita. (Sin turni al S-ro Max Mendlewicz, 16, rue Gambetta en Lens).

Detalajn sciigojn pri la kongreso mem kaj liston de aliĝantoj ni publikigos en la proksimaj numeroj de NjE.

POEZIO

SPLENO

Spleno ? Diru do kio ĝi estas, al mi !
— Kortuŝa memorajo kaj dolĉa kares'.
Kiujn oni konfirmus per timema konfes'.
— La estonta tempo de l'bela verb' ami !
— Lipa floro kies oni estus abel ;
— Bruo de kisoj zumanta en la orel ;
— Koro ŝajnante morta, sopirant' treme,
Kaj por fratin' animo batant' ameme.
— La bedaŭro "vidi" sian fuŝan vivon
Kaj ne kompreni la tutan poezion
De feliĉo simpla, en bela lando via,
Apud ĉarma virin' kun la nomo Lya.
— Ni ĝuis vesperon, senparoluj, timaj...
Sed oni pli amas, estante malproksimaj.
Ni soifas senfinaĵon; kaj sopir'
De nia koro fariĝas arda dezir'.
Ambaŭ forĵeti splenon, kisi... antremi...
Kaj kanti amon en eterna kanzono.
— En dia moment' senti tiun bezonon,
Karulin', splen' estas nur la dezir' ami !

C. VERNAY.

Konstanta subteno

Unua listo.

Bonvolis malavare helpi "NjE" la ĉi subaj samideanoj kiujn ni tutkore dankas :

S-ro D. à D.	1.00
Entute	37.00

Les Grands Magasins de "L'Impeccable" à Dunkerque ont bien voulu nous aider également en nous remettant de très belles primes. Nous les attribueront à ceux de nos lecteurs qui nous auront transmis le plus grand nombre d'abonnés au 28 février.

Nous remercions tout spécialement M. Goujon, l'actif et aimable directeur-propriétaire de "L'Impeccable" pour son geste généreux en faveur de notre revue.

NIA INSIGNO

La admonon de Samideano S. al la porto de nia insigno mi tute aprobas. Estas evidenta, ke nia insigno havas tute alian signifon ol tiu de politika aŭ sporta insigno, kaj mi opinias, ke ĉiu vera Esperantisto devas ĝin porti. Tamen estas ankaŭ evidente, ke ĝi tro similas al politika aŭ alia insigno kaj homoj, kiuj ne konas Esperanton povas maldistingi ĝin... En tiuj faktoj estas la kaŭzo pro kiu multaj ne portis la verdan stelon. Tion mi jam multe pripensis kaj serĉis rimedon plibonigi la aferon, sed ĝis nun mi ne trovis. Eble estus bone porti la problemon antaŭ la publiko kaj malfermi konkurson aŭ demandi la legantojn pri la plej bona maniero porti insignon. Mi opinias, ke oni povas tiel formuli la problemon :

« Insigno diskreta, ne similante politikan aŭ sportan insignon, kaj tamen bone videbla. »

La plej bona maniero vidita de mi ĝis nun estas tiu de S-ro Humez : malgranda stelo sur pinglo, kiun oni pikas en la refaldo de jaketo, ne en la butonruo, sed pli malsupre.

La problemo ŝajnas iom infaninda tamen mi opinias ke ĝi estas sufiĉe grava por nia movado, ĉar tre malmultaj homoj portas la stelon.

A. D.

TRA LA GRUPOJ

AMIENS.

Le 23 décembre, à l'Hôtel de Ville, à l'occasion du cinquantenaire de l'Espéranto, causeries et lectures par M. Moitié et M^{me} Colléatte : Zamenhof, sa vie et son œuvre. — Nécessité de l'Espéranto. — Les Espérantistes font-ils œuvre anti-française ?

Le 15 janvier, soirée de propagande : L'Espéranto couvre le monde, par M. Guillaume; l'Enseignement officiel de l'Espéranto dans les écoles, par M^{me} Faucher; par l'Espéranto à travers l'Europe tourmentée, par M. Petit; Chants en Espéranto, par M^{me} Kalnine; "Antaŭen !", film présenté par son auteur, M. Mahé.

BONNE NOUVELLE POUR LA SOMME. — Sur leur demande, des autorisations seront accordées par M. l'Inspecteur d'Académie aux instituteurs et institutrices qui voudront enseigner l'Espéranto pendant les loisirs dirigés.

AVIS. — Le groupe d'Amiens possède deux grands portraits du Docteur Zamenhof. Il en céderait un volontiers au groupe qui voudrait mettre à l'honneur l'image du Maître à l'occasion de fêtes. S'adresser à M^{me} Colléatte, 17, rue Le Mongnier à Amiens.

BÉTHUNE.

Nia elementa kurso, gvidita de S-ro Stuit finiĝis. Ne granda, sed vere interesata rondo, sekvis tiun kurson. En la lasta kunveno ni decidis daŭrigi la studadon kaj regule kunveni. S-ino Neuville Fortis gvidas la novan kurson, kiu estas vizitata de la malnovaj kaj ankaŭ novaj adeptoj de nia lingvo.

BOULOGNE-SUR-MER.

En la dua parto de julio okazos grava katolika kongreso nomita "Congrès Marial". Jam kelkaj samideanoj antaŭvidas la eblecon kunigi pri tia okazo la katolikojn fremdajn kiuj venos multnombre en nian urbon. Tiuj lastaj estos sendube feliĉaj, ne konante sufiĉe la francau lingvon paroli la zamenhofan.

Ĉiuj la kursoj daŭrigas bone kaj kunigas multajn gelernantojn.

La 12an de decembro okazis kiel kutime tre agrabla festeto sub la konduko de F-ino Pannevin, honora prezidantino de la Grupo.

S-ro Duchochois kiel ĉiam tre agema klopodas starigi grupon en Gamaches (Somme).

BOURBOURG.

Grupo estos baldaŭ starigata en tiu ĉi loko dank'al agemeco kaj sindonemo de F-ino Dumez, lernejdirektorino, kiu gvidas kurson.

La 19an de januaro, okazis en la Urbdomo, sub prezido de la Urbestro, bela parolado de S-ro Degand, advokato kaj prezidanto de la Dunkerque-a Grupo. S-ro Stuit, la simpatia Ce-profesoro faris la provlecionon antaŭ ĉ. 120 personoj, inter ili multaj geinstruistoj. Kelkaj Dunkerqueanoj, dezirante pruvi sian simpatian al F-ino Dumez kaj kuraĝigi la gvidantojn de nia movado en tiu urbo, vojaĝis tutspeciale al Bourbourg. Entute bonega sukceso.

DESVRES.

La 18an de novembro, sukcesa prelego de S-ro Dumarquez, en la Urbdomo, pri "Mondlingvoj kaj Esperanto".

En la kurso por plenkreskuloj, gvidata de S-ro Dumarquez laŭ Cselmetodo ĉeestas 14 lernantoj, el kiuj 5 estas instruistoj.

Espéranto en la lernejoj.

En la ĉirkaŭaĵoj de Desvres, kelkaj geinstruistoj instruas Esperanton en la normalaj studhoroj laŭ la permeso de la Inspektoro :

en Wirwignes : S-ro Bouvis,

en Saint-Martin Boulogne : S-ino Baheux.

DUNKERQUE.

En restoracio Trassaert, okazis la 17an de decembro, gaja vespero. F-ino Kalnine, ĉarma estonino, aŭdigis kelkajn modernajn kantojn, tradukitajn esperanten.

La 19an, en la Urbdomo, 50 gesamideanoj atente aŭskultis interesplenan prelegon faritan de F-ino Kalnine, pri Estonujo. Petata de kantŝatantoj, ŝi denove kantis kaj pasigis al ni, vere agrablajn momentojn, bedaŭrinde tro mallongajn. Post tiu kunveno, antaŭ la pordego de la Urbodomo, okazis la ĝenerala fotografado de la Grupo.

La 17an de januaro, samideano Stuit, el Nederlando, paroladis antaŭ 50 samideanoj. La temo de lia parolado estis "Vojaĝimpresoj de Norda Skandinavio al suna Afriko". S-ro Stuit vojaĝigis nin per belaj lumbildoj. Ĉar la preleginto gvidos kursojn en la najbara regiono, ni esperas baldaŭ lin revidi inter ni.

Unu el niaj agemaj grupanoj, F-ino Dumez, kiu lastatempe translokiĝis al Bourbourg, intencas starigi esperantistan Grupon en tiu urbo. Provlaciono okazos en la tiea Urbodomo, merkredon la 19an de januaro. Kurso komencos poste.

MALSANO. — Grava malsano trafis nian Vicprezidanton, F-ino Spyns. Tamen de kelkaj tagoj ŝia stato pliboniĝis kaj ni esperas ŝian baldaŭan resaniĝon.

Nia amiko Birembaux, el Saint-Pol-sur-Mer, estis trafita de malsano. Ni tulkore deziras al tiu fervora samideano plenan kaj rapidan resaniĝon.

NASKIGO. — Ges-roj Caubel, el Malo, sciigis nin pri la naskiĝo de ilia knabineto Renée. Ni estas feliĉaj gratuli tulkore niajn sindonemajn amikojn. Jen maniero plivastigi nian esperanton familion.

ECQUEDECQUES.

Gesinjoroj Ansart, geinstruistoj en Ecquedecques, kiuj vizitis la kurson de S-ro Stuit en Lillers, komencis de kelkaj monatoj instrui en sia vilaĝeto. Entute 15 novaj amikoj de Esperanto partoprenas. Imitinda ekzemplo!

FRESNES-SUR-ESCAUT.

La 12an de decembro okazis tre bela sukcesplena propaganda festo. La programo de la festo estis tre alloga, tre varia kaj interesplena. En grandega teatro plenplena amasiĝis ĉirkaŭ 700 personoj. La Respublika Trumpetistaro de Fresnes partoprenis en la programo. Tre aplaudataj estis S-roj Masselier, Piette, Dufresnoy, Monnart kaj F-inoj Michel Basquin, Hermant, Gonthier kaj la plejuna pianistino en la tuta mondo trijaraga Rolande Dufresnois. Oni finis tiun neforgeseblan feston dancante ĝis noktomezo.

Okaze de la datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, S-ro Centnerŝver dum sia leciono la 15an de decembro prelegis pri la vivo kaj verko de nia Majstro.

LENS.

Jen la nova Komitato elektita de la Generala Kunveno kiu okazis la 24an de novembro: prezidanto, S-ro Max Mendlewicz; vicprezidantoj: S-ino Putallaz kaj S-ro A. Joye; kasistoj: S-roj C. Vala kaj M. Carlier; sekretario: S-ro Joye, (88, place du Cantin); helpsekr.: F-ino L. Schleider; delegito por la Gazetaro: S-ro Eug. Dubois; delegito por la Radio: S-ro R. Erjavec; komitatanoj: S-roj Korinberg, Letaillier kaj Frydman; por la gajaj vesperoj: F-ino Mauricette Carpentier.

Malfermo de nova kurso, gvidata de S-ro E. Dubois, instruisto, (40 lernantoj).

La Grupo organizis grandan feston kaj balon la 15an de januaro pri kiu ni raportos poste.

LILLERS.

Post sukcesa kurso gvidita de nia amiko Stuit fondiĝis nova grupo en Lillers. Oni elektis jenan komitaton. Prezidanto: sinjoro Ansart; vicprezidanto: S-ro Devis; dua vicprezidanto: F-ino Blaise; sekretario: F-ino Potvin kaj kastistino F-ino Mathyssens. La nomo de la nova grupo, kiu promesas iĝi vigla, estas "La Juna Stelo". Ni estas feliĉaj partopreni en la disvastigo de la bela kaj granda idealo, kiu estas la mondlingvo Esperanto. Finfesto aranĝita por la gelernantoj okazos sabate la 22an de januaro.

SAINT-OMER.

